2-a Jaro, N-o 4 (56) APERAS S.A.T. SEMAJNE 22. Oktobro 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktejo: Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz | Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Al la Tuta SAT-anaro!

Jam de kelka tempo forpasis la V. Kongreso. Ĝin karakterizis la evidenta deziro forigi definitive ĉiujn motivojn je malkontento ĉe la membroj.

Unu el tiu motivoj, eĉ la plej grava, estis la pli- malpli prava riproĉo pri unuflankeco de la redaktado de Sennaciulo. Tial la Kongreso decidis starigi redakci-komisionon konsistanta el reprezentantoj de la diversaj tendencoj.

Ĉar la Kongreso praktike ne povis formi tiun komisionon inter la ĉeestantoj, ĝi lasis tiun zorgon al la Leipzig'a SAT-anaro. Tiu ĉi komprenis klare sian mision; la 2. septembron, ĉe plena kunveno, ĝi elektis 8 anojn el kiuj 2 estas anarkistaj, 2 komunistaj, 2 socialdemokrataj, 2 senpartiaj (vidi la nomojn sube).

Jam funkcias tiu komisiono. Sekve, de nun, neniu SAT-ano havas motivon por plendi, riproĉi kaj malfavoriĝi en la varbado. Ni do rajtas esperi, ke tiu reformo devas marki la komencon de nova vivo. Se vere la "unuflankismo" de la redakcio kaŭzis tion, ke multaj k-doj ne reabonis, ĉesis propagandi, do nun la certeco ke ĉiu tendenco estas egale atentata, devas kaŭzi pligrandan viglecon de nia entrepreno.

Ni retrovis la unuanimecon: streĉiĝu do niaj fortoj por varbadi, propagandi por SAT, por ĝiaj presorganoj, ĝiaj libroj. Propagandu en la kursoj! — Penu por ke ĉiu membro de via loka grupo estu ankaŭ membro de SAT kaj abonanto de Senn. kaj Sen. Rev.! — Kuru de unu konatulo al alia! — Ĉiun renkontitan esperantiston demandu ĉu li jam legis . . . aniĝis! — Via loka grupo estas kampo tre fruktoporta: sufiĉas ĝin plugi! — Ĉe la kunvenoj postulu debaton pri SAT, kaj faru ke la grupo deklaru sian simpation por SAT kaj konsilu al siaj membroj ke ili aniĝu.

Por funkcii utile kaj malvolviĝi normale, SAT bezonas, en la daŭro de 1 jaro, almenaŭ 1000 novajn abonojn al Senn. kaj 800 al Sen. Rev. Tiu minimuma sukceso estas facile atingebla, se en ĉiu urbo, unu aŭ du seriozaj k-doj gvidos ordeme kaj metode la propagandon.

Antaŭen kamaradoj!

La Ekzekutiva Komisiono de SAT

* * *

Membroj de la Redakci-Komisiono estas jenaj gek-doj (ĉiuj en Leipzig)

Lewin, Arthur	SAT-ano	3051	(anarkista)
Teichmann, Johanna	„	957	„
Richter, Carl	„	125	(komunista)
Bässler, Otto	„	715	„
Schinkel, Richard	„	135	(sozialdem.)
Schröter, Oskar	„	3771	„
Vogel, Walter	„	174	(senpartia)
Lehmann, Clara	„	913	„

Maertz, Paul, SAT-ano 712 fakula konsilanto.

K-do Richter estas sekretario de tiu komisiono; adresu ĉiujn poŝtaĵojn jene:

"Redakcio de Sennaciulo"
Leipzig-Stötteritz, Colmstrasse 1 (Germ.).

"NIGRA REVOLUCIO"

de *A. HARI*

La negra proletario, tiu plej granda faktoro de ekonomia vivo de Usono kaj de multenombraj eŭropaj kolonioj, la nigraj laborulaj manoj, kiujn la tutmonda burĝaro jam pli ol tricent jarojn ekspluatas, fine povos laŭte proklami pri siaj rajtoj je homa ekzistado. Nun kom. gazetaro de Ameriko kaj de potencoj-kolonizistoj nemalmulte atentas pri negra problemo, ĉar la proletaro de l' tuta mondo devas bone klarigi al si, kiel subtenos la blankajn sklavojn kaj minacos al la kapitalista mondo estonta nigra revolucio.

Kia estas historio de tiel nomata negra problemo? En 1619 al haveno Ĝemstoŭn (Virginio) venis dana vaporŝipo, kiu elŝipigis sur la bordon kunkatenigitajn po du nigrajn sklavojn. Tiujn negrojn oni vendis al lokaj plantejmastroj por malgranda prezo — por kelkaj pakaĵoj da tabako. Tiuj dudek nigrhaŭtuloj estis pioniroj de negra sklaveco. De tiu tempo komerco per nigraj laborulaj manoj sukcese disvolviĝis ĝis 1808, kiam altkultura registaro de Usono eldonis la dekreton, kiu malpermesis aĉetadi kaj vendadi negrojn. La burĝaro nenion faras sen certa celo, eĉ, kiam ĝi kaŝas siajn agojn sub bombastaj frazoj pri humaneco kaj homamo. Oni ne devas opinii, ke la historia milito inter nordaj kaj sudaj Amerikaj ŝtatoj okazis ekskluzive pro malkonsento pri la negra problemo. Ti- kiam juna industrio de l' nordaj ŝtatoj jam komencis evolui per gigantaj paŝoj tiel, ke nekvalifikitajn fortojn ĝi jam ne bezonis plu, ilia (de l' ŝtatoj) fama humaneco en la negra afero estis nenio alia, ol kruela ekonomia premego kontraŭ la sudajn ŝtatojn. Ĉi premego devis subigi al la industrio riĉajn fontojn de krudaĵoj — plantejojn de l' sudo. La fama agrikultura mastrumado de Usono — nun potenca faktoro ekonomia kaj politika ne nur de l' amerika, sed ankaŭ de tutmonda signifo — iĝis tiom potenca je 90% por la kosto de kromvaloro el nigra laborula forto, por la kosto de tiuj milionoj da nigraj sklavoj, kiuj mortis pro ekzekutado kaj murdo.

La manovro liberigi la negrojn estis des pli sendanĝera, ke la hipokrita dekreto de Linkoln, "liberiginta" pli ol 4 milionojn da negroj el sklaveco, neniel malutilis al la entreprenistoj. La negra maso, kiu ĉe tiaj tragediaj cirkonstancoj ricevis la delonge aspiritan liberecon, trafis straton senrifuĝa kaj senlabora. Post la sklaveco deviga ĝi sin trovis en sklaveco laŭvola, tio estas — ĝi devis reveni ajnkondiĉe al siaj antaŭaj mastroj, por ne resti sen panpeco. Oni povas diveni, ke la kondiĉoj estis multe pli kruelaj, ol ti-kiuj estis dum la deviga sklaveco, ĉar nun la entreprenisto ne rigardis la nigran sklavon, kiel objekton, kiun oni ĉiam povas

vendi kaj ricevi por ĝi certan monsumon. La negroj, ricevinte "la liberecon" trafis ankoraŭ pli malbonan malliberon: la plantejmastroj komencis utiligadi iliajn laborivon kaj sanecon ĝis la fino.

Mondekonataj sciencaj fortoj, sinjoroj amerikaj ekonomiistoj, unuvoĉe krias en siaj libroj, en sia gazetaro, ke la negroj tre malhelpas al la lando kaj malfaciligas normalan evoluon de amerika nacio. Sed fidindaj statistikaĵoj parolas pri alio. La nigra raso tute ne estas netaŭga por laboro kaj por kultura disvolviĝo, kiel tion asertas amerika burĝaro, por pravigi siajn agojn. Antaŭ 62 jaroj prezidanto Linkoln "liberigis" 4 milionojn da negroj, kaj grandega armeo da nelegivaj kaj malmultekleraj manlaboruloj estis subite ĵetitaj al labormerkato. Nun en Usono oni kalkulas ĉirkaŭ 12 milionojn da negroj, inter ili estas: 30000 instruistoj, 3500 kuracistoj, 1500 juristoj, 3400 malsuperaj medicinlaboruloj, 75000 oficistoj, 20000 elektroteknikistoj, 25000 aŭtomobilaj pilotoj, 22000 inĝenieroj kaj 6400000 farmistoj. Ĉi ciferoj ricevas specialan signifon, se oni atentas, ĉe kiaj netolereblaj kondiĉoj de politika kaj morala subpremo kulture evoluis dum la lastaj 62 jaroj negra maso. Al tio ankoraŭ oni devas aldoni, ke la negroj, konsistigante ankoraŭ en la jaro 1890 ĉirkaŭ 20 procentojn de l' tuta hejma geservistaro en Usono, la negroj, kies 75—90% tiam estis ekskluzive kamparaj terkulturistoj, nun havas sian propran artkulturon kaj kalkulas ĉirkaŭ 200 verkistojn, komponistojn, poetojn kaj pentristojn.

Ekzistas ankoraŭ unu cirkonstanco, kiu en la manoj de l' amerika burĝaro estas vera ardigilo por rasa malamikeco inter blankaj kaj nigraj sklavoj. Tiel nomata "nigra danĝero" ne estas malplena sono. La negroj plimultiĝas tre rapide, samtempe kvanto da blanka loĝantaro dum la lasta duonjarcento apenaŭ restas sur la sama nivelo kaj nur dank' al seninterrompa alfluo de novaj enmigrantoj.

Kiel do batalas la amerika burĝaro kontraŭ la nigra danĝero? Antaŭ ĉio per neaŭditaj dum la historio de, tiel nomata, civilizita mondo metodoj de ekonomia kaj morala subpremo. Pri ili oni ne bezonas multe paroli, ĉar ili estas bone konataj de ĉiuj. Sed mirinde vivforta nigra raso eltenis malutilan klimatŝanĝon kaj ĉiujn sagacajn leĝojn pri "gardo de l' raso", elpensitajn de kutimiĝinta al krueleco prudento de "janki" (usonano). Kaj grandega kultura movado de l' negroj, fine, transiris la limon de l' malpermesoj, kiun metis antaŭ ĝi la amerika burĝaro sur la vojon de spirita emancipiĝo de l' nigra raso.

Fino de XIX. jarcento pri multo instruis internacian burĝaron. Ne havante forton haltigi ekonomian kaj kulturan ĉiujare kreskantan fortiĝon de l' negroj, la amerika burĝaro sin okupis pri klasa distavoligo de l' nigra raso. Laŭ sukcesa iniciato de bankieroj el "Uoll-Strit" (Wall-Street), kreiĝas vera negra burĝaro, kapitalistoj el la plej subpremita maso de nigraj sklavoj. Nun en Usono ekzistas 28 bankoj, apartenantaj al negroj, ĉirkaŭ 600000 de meza profito de farmbienoj kaj plantejoj.

El inter negroj eliris ĉirkaŭ 20000 plimalpli grandaj butikistoj. Entute negra burĝaro posedas nemoveblan havaĵon kaj diversajn valoraĵojn por la sumo pli ol unu miliardo da dolaroj.

En Moŭnd-Bajan (Misisipo) al negroj apartenas grandegaj oleuzinoj kaj kotonaj plantejoj. En la sama regiono estas tuta urbo — Redberd —, loĝata ekskluzive de negroj. En Arkanzaso negraj industriistoj konstruas gigantan teksfabrikon, kies sola ekstera aranĝo kostas pli ol milionon da dolaroj. Borsa statistiko en Usono kalkulas 9 negrojn — miliardulojn.

Lasante aperi nigran kapitalistan klason, la amerika burĝaro metis antaŭ si la duoblan taskon: unue, kun ĝia helpo ankoraŭ pli forte subigi al si negran proletaron, due, sin garantii, por ke negra kapitalo ne forfluu post la limon. La teorio de fama Harvej ("harvejismo"), kiu aspiris revenigi ĉiujn negrojn al la unua patrio — Afriko kaj esperis aranĝi aŭtonomian politike kaj ekonomie negran regnon —, maltrankviligas kapitalistan Amerikon.

La negra burĝaro sukcese plenumis donitan al ĝi taskon. Nenie nigra laborula forto estas tiel ekspluatata, kiel en entreprenaĵoj, apartenantaj al negroj. Negroj-advokatoj elpaŝante en blankulaj juĝejoj plene subtenas interesojn de l' reganta klaso kaj helpas al blankaj entreprenistoj fari sklavigajn kontraktojn kun nigraj sklavoj. Negroj-poetoj en siaj versaĵoj prikantas kapitalistan reĝimon kaj noblecon de malavaraj nigraj kapitalistoj. Kaj tiuj el negraj verkistoj, kiuj penas malfermi la okulojn de l' proletaro, por ke ĝi ekvidu veran aferstaton, tre baldaŭ kaj ne sen helpo de nigra burĝaro iĝas viktimoj de la plej kruela en la mondo amerika klasa justeco.

Tamen estonteco montros, ke la esperoj de l' amerika burĝaro estis tute senbazaj. Sekve de l' klasa distavoliĝo aperis krom nigraj kapitalistoj, antaŭ vera negra proletaro, kiu havas nenian havaĵon, krom siaj du manoj. Vicoj de laborantaj negroj nun havas pli ol unu milionon da industriaj laboristoj kaj ĉirkaŭ du milionojn da kamplaboristoj. Por reprezentantoj de l' negra raso en Kamparana Internationalo estos ankoraŭ multe da laboro, por organizi milionajn amasojn da nigra terkulturista proletaro. Sed laboro de Profintern en tiu branĉo ĝis nun renkontas preskaŭ nevenkeblajn barojn.

Temas pri tio, ke amerika kompartio uzas ĉiujn fortojn por krei revoluciajn profesiajn organizaĵojn neniel laŭ la rasa, sed nur laŭ klasa principo. Ĝi estas des pli malfacila, ke la negroj mem havas por siaj blankaj laborkolegoj grandegan rasan malamon. Tion oni povas klarigi per elpratempa sento de subpremeco kaj venĝemo, kiun havas la nigraj sklavoj por siaj subpremantoj-blankuloj. Dum la lastaj du jaroj en tiu fako oni atingis grandajn sukcesojn. Nun pli ol 100000 negroj estas organizitaj en profesi-sindikatoj, kaj tiu kvanto ĉiam kreskas.

En eŭropaj kolonioj en Afriko la situacio estas ankoraŭ pli komplika. Militpunlabora reĝimo, kiun starigis blankaj okupantoj, eliminas ĉian laboreblon por negraj revoluciaj organizaĵoj. Tamen, heroaj penoj de franca kompartio rompis la muron ankaŭ de tiu unuavide nevenkebla baro. Revolucia movado inter afrikaj negroj ĉiumonate sukcesas pli kaj pli.

Ĉi tie, samkiel en Ameriko, multe malhelpas la laboron agado de negraj religipatriotaj organizaĵoj laŭ ekzemplo de "afrika sangfrataro" en angla Ameriko aŭ de "ligo por filozofi-studado" kaj aliaj, kiujn fondis nigra burĝaro je la kostoj de eŭropaj registaroj.

La estonta kongreso de nigraj sklavoj de l' tuta mondo — ĝi estos grava etapo sur la vojo al ideologia liberiĝo de l' nigra raso. Nigra revolucio ne estas malproksima, kaj tiu kongreso devas alporti al la tutmonda laborarmeo novajn multmilionajn masojn de revolucia negra proletaro.

Elukrainigis Fedotov

(728)

Kun la germana delegacio laborista al Sovetlando!

III

En *Moskvo*

Alveninte en Moskvo kaj akceptite per grandega entuziasmo mi ne povas tiom detale raporti pri ĉio, kion mi vidis tie. Mi kredis ke sufiĉas, se mi donas kelkajn diversajn bildojn de la multaj impresoj. Sed antaŭe raporteto pri la vivo en la urbego mem.

En la stratoj de la frua mateno ĝis malfrue en la nokto ondas la trafiko. Antikvaj vehikloj de kamparanoj miksas sin kun tramoj kaj aŭtomobiloj. En la lastaj semajnoj oni ricevis de Anglio 60 aŭtobusojn de la 100 menditaj, kaj per tio oni establis 6 liniojn, kiuj bonege helpas al pli bona ordigo de la trafiko. Ĉe anguloj kaj subdompordoj marĉandistoj helpas sin dum tempo de senlaboreco. La vendaĵojn ili ricevis de la Moskva konsumkooperativo kaj al mi ŝajnis ke ili ne malsatas tiom per tiu laboro kiom en Germanio niaj malfeliĉaj senlaboraj k-doj. Per tio mi tute ne volas aserti ke la moskvaj laborserĉantoj havas enviindan sorton, ankaŭ ilia stato nur povas esti provizora ĝis kiam la loka registaro povas fine forigi tion en kontentiga senco por laboristaro.

La magazenoj estas ree plenaj de la plej diversaj komercaĵoj. La prezoj por manĝaĵoj estas multe pli malkaraj ol ĉe ni, kontraŭe la prezoj por industriaĵoj estas pli altaj, nur malofte ni renkontis samajn prezojn por ili, kiel ĉe ni.

La ordo en la stratoj estas bonega. Speciale rimarkinda estas la manko de "verduloj", konataj policanoj de nia Hindenburg-a respubliko. Nur malofte tiel nomataj "milicanoj" vidiĝis kaj tiam ne per tia terura aspekto. Ankaŭ ĉe stratanguloj ili regulas la trafikon trankvile kaj sekure. En ĉiuj stratoj kaj stratetoj ili diligente riparas kaj renovigas kaj estas ĝojo vidi tion. Mi kredis, ke nur malmultaj jaroj sufiĉos por doni al Moskvo la aspekton de pura kaj moderna urbego. La popoloj kurante kaj irante ĉiuloke estas miksitaj de multaj gentoj, orientaj kaj okcidentaj popolanoj formas bildon tre pentrindan.



DETALO PRI UZADO DE ESPERANTO EN POŜTIO DE USSR.

Ĉi-supre estas presata reproduktaĵo de la unua esperantlingva poŝtkarto, eldonita oficiale de nia poŝt-komisaro. Kiel oni vidas, ke sur ĝi estas ankaŭ franclingva teksto. Krom ĝi estas eldonataj (specimenojn ni jam vidis kaj havis en manoj) jenaj poŝtkartoj: 1. kun enpresita 3 kopeka poŝtmarko kaj teksto en du lingvoj — rusa kaj esperanta; 2. kun enpresita 7 kopeka poŝtmarko kun teksto en tri lingvoj — rusa, franca kaj esperanta.

Dum demonstracio sur Ruĝa Placo

Grandaj, densaj, ne trans videblaj taĉmentoj de proletamasoj almarŝis el ĉiuj urbpartoj ruĝan placon. La unuopaj uzinoj kaj distriktoj havis proprajn muzikistarojn, standardojn kaj transparentojn. La lastaj montris enskribojn, kiuj atestis ĉiam la pacemon de la rusaj laboristoj kaj la deziron ekstarigi unikan sindikatmovadon tutmondan. Kapo ĉe kapo staris la proksimume 150 ĝis 200 000 proletoj kaj sciigis al la germanaj delegitoj kaj samtempe al germana laboristaro ilian profundan simpation. Ĉeestis ankaŭ la ĵus alvenintaj svedaj k-doj kaj ili same fratece estis salutitaj. Ambaŭ delegacioj lokiĝis antaŭ la maŭsoleo de Lenin. Kiam Rykow kaj Bucharin parolis, la amasojn ekkaptis nepriskribebla entuziasmo. La ondanta amaso similis al brueganta maro. Ĉiu el ni sentis ke la simpatio estis vera kaj ne artefarita, tio-ĉi ne estis diktatureco, sed tiuj estis la rusaj laboristaj aregoj, kiuj sekvas ĉien al sia gvidantaro kaj kiuj estas pretaj je ĉiu horo defendi sian ŝtaton ĝis la lasta sangoguto. Speciale rimarkinda por ni estis la malpompa simpleco de la gvidantoj. Rykow samkiel Bucharin ne diferencis en siaj vestaĵoj kaj en sia konduto de la simpla rusa laboristo.

Kiam por la germana delegacio ekparolis k-do Freiberger, pliiĝis la ventego de entuziasmo al fortega uragano. La amasoj provis trarompi la barilon de milicistaro. Ĉiu volis paroli kun la delegitoj, ĉiu volis konatiĝi persone, volis ilin konvinki pri la amo de rusa laboristaro por la germana proletaro.

Post kelkaj alparoladoj, kiuj estis aŭdebligitaj per radiaj aŭdigiloj, por ke ĉiu sur la grandega placo povu kompreni ĉion, la amasoj pretermarŝis la Lenin-an tombejon. Senfinaj alvokoj al germana laboristoj, por sindikat-unueco eksonis de la ornamitaj kupoloj kaj kupraj tegmentoj preterpasantaj ne finantaj amasoj. Nur parto povis pasi, alie ni devus atendi multajn horojn.

La delegitaro estis profunde emociigita pro la vera entuziasmo de niaj rusaj gefratoj. Estis bildo kiu oferis bonegan rigardon en la animo de rusa popolo. La demonstracio distinkte montris ke unueco en Rusio ne plu estis fata-morgano, sed realeco.

Ĉe la tombo de Lenin

Post la manifestado de la moskvaj proletoj la delegacio vizitis la maŭzoleon de Lenin.

Antaŭ la Kremlo, la eksa imperiestra palaco, staris la tombo de la granda laborista gvidanto, kreita de bonega artisto, kaj ĝi multe impresis pro ĝia malluksa kaj tamen monumenta konstruaĵo. La malantaŭaĵon formis la longa altega murego de Kremlo. Kaj super ĝi brilis la de la palacoj kaj preĝejoj caraj. Ili vekis memoron je la timigitaj kaj sangavidaj subpremantoj de la homaro. Hodiaŭ flirtas sur la turoj la simbolo de libereco: la ruĝa flago.

Ĉe ambaŭ flankoj de la maŭsoleo estas enterigitaj sub florbedoj la herooj de la revoluciaj bataloj. Antaŭ la tomba konstruaĵo tage kaj nokte du ruĝarmeano gardadas, esprimante per tio la honoregon al la mortinto. La rusaj laboristoj parolas pri Lenin kun granda estimego. Ĉiuvespere, kiam la eniro estas permesata, longaj vicoj atendis pacience ĝis kiam ili povus vidi ankoraŭfoje ilian mortintan liberiginton. Kiel fremdaj estas tiuj al la koroj proletaj, kiuj parolas pri li kiel "nova sanktigito" aŭ "ruĝa caro". Ili ne ekkonas la gravan diferencon, kiu ekzistas inter dio kaj reĝa adoro kaj la honorigo de la rusaj laboristoj por iliaj granduloj en la liberecbatalo de proletaro. Dum dio estas io neklarigebla, kaj imperiestroj kaj reĝoj estas altruditaj al popolo; ĉi-tien lageproletoj venas al tombo de unu, kiu marŝis tra mizero kaj malsato kun ili kaj gvidis la amason al progreso kaj libereco, ili sciis, ke li estis la plej klara kaj fidela gvidulo.

La interno estas drapita per ruĝa tuko. Enmeze de la haloj ripozas sur soklo la mortaj restaĵoj de Lenin. Lin kovras vitra kovrilo, por ke ĉiu povu vidi lin ankaŭ en morto. Li estas vestita per simpla soldata vesto kaj portas kiel solan ornamon la ordenon de la ruĝa standardo. La maldekstra mano estas pugnigita, li kuŝas tie kvazaŭ li dormus. Nenio montris ke li jam de pli ol unu jaro kuŝas sur la piedestalo. Ĉe kapo kaj apud piedoj senmove du soldatoj staras kaj faras la funebran gardadon.

Li jam mortis en plej bona aĝo, almenaŭ tro frue li forlasis la laboristaron de Ruslando kaj de la mondo.

Ni ree eliras, dume la ruĝarmeanoj senmovas. Ĉiu el ni silentis kaj meditis pri propraj ideoj.

Inter la esperantistaj k-doj

Neforgesinte nian jarlibron mi havis la eblecon, telefoni la duan tagon al k-do Drezen. Li ankaŭ estis ĝojigita ke li invitis min en sian loĝejon por amika interparolado. Mi nature kaj vole akceptis kaj vespere mi tramveturis al la renkontejo en lia domo.

Kiam mi frapis la pordon mi jam aŭdis esperantajn sonojn, kiuj anoncis al ni ke jam aliaj k-doj kolektiĝis. Mi kore kaj kamaradece estas salutita kaj baldaŭ mi persone konatiĝis kun k-do Drezen, Demidjuk, Nekrasov kaj aliaj. El la buŝo de ĉiu elfluas pli bone la lingvo pli bone ol mi mem ĝin estras. Tamen ni tre bone interŝanĝis niajn pensojn, speciale pri Rusio, kio estis tre komprenebla. Ankaŭ aliajn problemojn ni tuŝis kaj mi pasigis kelkajn interesajn horojn. Ĉe la ĉie uzata samovaro ni finis nian kunveneton, kaj mi adiaŭis kun la konscio ke mi konatiĝis kun bonegaj kaj sinçeraj k-doj kaj iris kun aliaj k-doj al mia hotelo en Balĉuk. (Daŭrigota)

W. Bennewitz (2378).

Anstataŭ amnestio — plia teroro de klasjusteco

La internacia proletaro certe havas intereson, ekscii, kiel nun laboras la klastribunalo en Germanio. Dum la lastaj monatoj okazis granda batalo por la liberigo de la proletaj politikaj kondamnitoj, kiu estis aranĝita de la organizaĵoj "Ruĝa Helpo" kaj "kom. partio". Tiuj organizaĵoj eldonis listojn, en kiuj la subskribintoj de la registaro, postulas ke ĝi liberigu ĉiujn politikajn kondamnitojn. Ĝis nun subskribis pli ol 900000 homoj. Eĉ Hindenburg, la nova regna prezidanto en Germanio, diris dum la komenco de sia regadlaboro, ke li intencas eldoni leĝon, por liberigi "preskaŭ ĉiujn politikajn kondamnitojn". Malgraŭ tio, la justec- "maŝino" laboras plue. Laŭ akurataj statistikoj estas kondamnitaj dum la monatoj majo, junio kaj julio 1925 entute 360 revoluciemaj laboristoj pro "politikaj krimoj". Ili estis kondamnitaj entute je 415 jaroj da malliberejo, fortikaĵo kaj punlaboro kaj 32015 markoj da monpuno. (Unu laboristo perlaboras ĉe 54 hora labortago 30—50 markojn!)

Sole la "bona ŝtattribunalo" en Leipzig kondamnis dum tiuj 3 monatoj en 26 procesoj politikaj 76 proletojn je 63 jaroj 8 monatoj da punlaboro kaj 70 jaroj 1 monato da malliberejo kaj 12480 markoj da monpuno!

Tiu teruro de la klasjusteco signifas grandegan provokadon de la laboristaro. Pro la premo de la proletaro la registaro estis devigata, eldoni amnestiproponon en la parlamento. Sed kiel ĝi aspektas? Laŭ ĉi tiu leĝpropono de la registaro nur estus amnestotaj krimoj kiuj okazis antaŭ la 1. de oktobro 1923 kaj estis ne punitaj per pli ol 2 jaroj da malliberejo. Punlaboruloj entute ne estu amnestotaj! Kion signifas tio? Eĉ se la propono certe ne estas propono, per kiu la laboristaro povus esti kontenta, la regna registaro per tia propono ja principe konsentis, ke ekzistas la devo, korekti la grandegajn terorjuĝojn. Sed al la klasjuĝuloj tio estas indiferenta. La justecgilotino laboras pli intense, kiel pruvas la pli supre publikitaj ciferoj. La germana laboristaro devas batali pro tio per pli granda forto kontraŭ la klasjusteco kaj por la absoluta amnestio!

Trad. el la sudgermana lab. gazeto

Otto Bächtle (SAT-ano 1927).

Bankrotiĝo de la Daves-kontrakto

Dum aŭgusto 1925 la plano de ekspertoj estis akceptata en la regna parlamento. Sekve nun unu "Daves-jaron" ni jam travivis.

Kion ni profitis el la Daves-pakto? Laŭ la promesoj diversflankaj ĝi devis doni al ni pacon kaj garantii ĉefe ekonomian kreskon kaj plibonigon de la vivkondiĉoj por laboristoj. Tiamatempe jam parto da konsciaj laboristgvidantoj avertis kaj pledis por malaprobo de la kontrakto, titolante ĝin ĝuste kiel ŝnuro ĉirkaŭ la kolo de la proletaro.

Nun la "Daves-suno" estas brilanta jam tutan jaron, kaj kio montriĝis? Montriĝis ke pravis la avertintoj kaj, ke ne la suno brilas super la laboristaro, sed male, danĝera fulmotondro minacas. La iluzioj, kiujn oni arte enplantis en la cerbon de la proletaro, forflugis; evidentiĝas la pura senvualita grimaco de la vereco.

Grandskala ofensivo de la entreprenistoj, amasaj maldungoj kaj fabrikfermado, pli altiĝinta nombro de senlaboruloj, plialtigitaj impostoj kaj kontribuoj — estas la fruktoj de la unua pasinta jaro, reginta laŭ la plano de Daves.

En Ruhrteritorio estas fermitaj laborejoj unu post alia. Ĉiutage senlaborigo de proletoj okazas. Ankoraŭ ne valoras la novaj kontribuoj, kaj salte jam altiĝas la prezoj por gravaj nutraĵoj. La bienposedantoj intence retenas siajn produktojn, por havigi al si pli poste kromprofitojn.

La oficiala nombro de subvenciitaj senlaboruloj estas 200000, sed laŭ la plej novaj detalaĵoj ĝi superas 1000000 entute. Ankaŭ burĝaj gazetoj devis tion konfesi.

Intertempe eĉ pli akriĝis ekonomiaj cirkonstancoj, disvolviĝis agresemo de kapitalistaro. Plimalaltigo de la salajro kaj plilongigo de la labordaŭro estas la celo de la fiuloj. 150000 masonistoj troviĝis dum kelkaj semajnoj en strikbatalo, kaj kiel krono la konstrupotenculoj lokaŭtis ĉiujn masonistojn en Tutgermanio.

Al 200000 tekslaboristoj oni anoncis la maldungon por la 5a de septembro.

En diversaj strikagoj disaj la laboristaro provas deturni sian sorton.

Eminenta pliakriĝo de klasbatalo komeniĝis, postulante de laboristaro ĉiujn fortojn por ne esti venkito en tiu, ne forturnebla kunpuŝiĝo de la klasoj, ĉar nova Daves-jaro alportos ankoraŭ pli da katastrofaj okazaĵoj. *Voko.*

Esperanto en Praktiko

Se ni ekrigardus la esperantan movadon birdperspektive oni vidus ĝin kiel monderon agante duflanken — propagande kaj praktike. Ja pratempe la propagando estas ĉefa sed tuj poste, uzo devas sekvi. Estonteco kuŝas en la utileco.

Por penetrigi ĝin en la vivon mem, neniu taŭgas pli ol realigo en ĉiu fako de la homa aktiveco.

Tiu kiu laboras obstine al tiu penetrigo, en la medio kiun li bone konas; agante tiam, kiam estas taŭga; frapante tie, kie li opinias trafa; ne kriante surtegmente por veki ridaĉojn sed donante servojn por pagi helpojn; tiu laboras por alkroĉi la esperantan al la ĉiutaga simpla vivado.

Firmigitaj de tiaj kelkaj ĝeneralaj principoj iuj kamaradoj de post tri plenaj jaroj laboras komune, sindone, preskaŭ mute por efektivigi la realecon de nia lingvo.

Ili komencis kun preskaŭ nenio. Ili naskigis malgrandan revueton, dupaĝa, poste kvar-, ses-, ok- kaj nun dekdupaĝa, klopodante precipe doni al ilia fako la internacian informadon, kiu tiam mankis; celante starigi veran tutmondan profesian dokumentaron kies valoro ebligas atenton pri la ilo kiu permesis ĝin amasigi.

Tiuj kamaradoj estas la poŝt-, telegraf- kaj telefonistoj.

Tiu gazeto estas "La Interligilo de l' PTT."

De post kelkaj monatoj naskiĝis ankaŭ "Rapida bulteno de la Interligilo" kiu nun aperas dufoje pomonate, eble baldaŭ semajne.

En la revuo aperas gravaj studaj raportoj, enketoj, informoj, teknikaĵoj.

En la rapidbulteno aperas la lastaj urĝaj fakinformoj, kiuj lasthore alvenis redakcion.

Studi funde; informi rapide. Kompreneble en la Korporacio tiu laboro ne restas malrimarkita. Oni vidis jam numerojn de la revuo eldonitaj de franca, rusa, svedaj, portugala, estonlanda, nacifederacioj. Tre baldaŭ aperos numero speciale zorgita de la Union Post office Workers en Grandbritlando.

La rapidbulteno jam montris ĝian taŭgecon post kelkaj tagoj post la striko en Paris, dank' al ĝi, svedaj, britaj fakgazetoj represis la plenan raporton de tia fakto!

Fine estas menciinde ke Interligilo estas nuntempe la sola, eĉ kalkulante alilingvajn, fakorgano internacia en PTT. medioj kiu tiel bone informas rapide kaj objektive.

Ĉiuj kolegoj, kiuj legos tion estas speciale petataj veni apud ni, kunhelpi, kunverki, kunlabori, kunpuŝi por enpenetrigi perlabore esperanton en niaj medioj.

Petro Filliâtre, la gvidanto.

P. S. La kolegoj kiuj mencios tiun artikolon abonante rajtas postuli de ni, de nun, rabaton de jarabono: t. e. ili nur pagos 10 fr. frankojn por Interligilo kaj por la Rapidbulteno. Adreso: Interligilo 54 rue Custine-Paris 18.

EL ANGOLA

Vivo kaj moroj de indiĝenoj

III (Daŭrigo).

Familia vivo — Geedziĝo

La *Kibala*-fraŭlo ofte agas multe pli simple kaj rapide. Kiam li ekvidas la plaĉan por li virinon, tiam li deprenas el la zonumo la ujon de l' monŝparaĵoj kaj geste montras al ŝi monereton da 30 aŭ 50 centavoj. Se ŝi akceptas tiun monon, tiamaniere ŝia koro konfesas sin kaptita, kaj la feliĉulo tuj marŝas por peti ŝin de ŝiaj gepatroj, kiuj fordonas la fraŭlinon kontraŭ donaco de 12 aŭ 15 eskudoj kaj unu vestotuko por ŝi. Sed tia ne estas tute ĝenerala kutimo. Oni uzas ankaŭ la peton de la geonkloj aŭ de la gepatroj, ĉu senpere, ĉu pere de aliulo, sen ke la fraŭlino estus antaŭe pridemandita. Kaj, se la familio decidas fordoni ŝin, la forŝirado de la harligoj aŭ ia ajn montro de antipatio utilos por nenio al la fraŭlino. Ŝi devas translokiĝi samkiel bovino ŝanĝas stalon, ĉar ŝia mizera kondiĉo de ino senvola ne permesas al ŝi la elekton aŭ la malobeemon.

Male, la fraŭlo el *Libolu* montriĝas pli pacienca kaj . . . pli forŝtelita. Post elekto de sia belulino, li petas ŝin (aŭ komisias iun por tio) kun la unua oferdonaĵo, kiu devas laŭ uzado konsisti el botelo da konjako, kelkaj buloj da tabako, unu pipo kaj unu naztuko. Se la gepatroj konsentas, la geedziĝo estas decidita. Tri monatojn poste, la fianĉo devas oferi novan donacon konsistantan el monsumo inter 12 kaj 30 eskudoj kaj alia botelo da konjako krom certaj aĵoj (fosilo, tabako, vitrobuletoj, ktp.) postulitaj de la tradicio. Sed la fianĉino ankoraŭ restas en la gepatra hejmo ĝis kompletigo de la hejmaĵaro. Du monatoj ankoraŭ devas pasi ĝis la tago de la geedziĝa festeno, kaj tiam la fianĉo devas donaci al sia bopatrino monsumon da kelkaj eskudoj. La fianĉino, akompanata de kelkaj invititoj kaj amikinoj, al kiuj la fianĉo oferdonas naztukojn, estas akceptata, ĉe siaj bogepatroj, de la patrino aŭ de onklino de l' fianĉo, kaj ĉi tiu estas tenata atendi ankoraŭ dum 5 aŭ 6 tagojn antaŭ ol revidi la edzinon kaj fali en ŝiajn brakojn.

La virino ĝenerale edziniĝas post la 15-a jaraĝo. Sed la edziniĝo povas esti decidita multe pli frue, kvankam la unuiĝo devos okazi nur post atingo de tiu aĝo. Ĉiu indiĝenino, kiu gravediĝas pro siaj fraŭlinaj petolaĵoj, estas devigata edziniĝi al viro konsiderata kiel patro, eĉ kiam ĉi tiu jam estas edzigita.

La poligamio — kiel mi jam skribis ĉi-supre — vere ne ekzistas. Edzino povas esti nur unu: la unua; ĉiuj ceteraj estas kromvirinoj permesitaj laŭ la moroj. Ili ne vivas komune, por ĉiu virino estas domo. Kaj la unua konservas ĉiam aŭtoritatecon super ĉiuj ceteraj.

La unua geedziĝo nur povas likvidiĝi tiam, kiam estas kialo por eksedziĝo. La cetera geunuiĝoj rompiĝas senregule kaj ne bezonas por tio pravigan kialon. La malbonagoj, la frapadoj kaj la senpotenceco de la viro pravigas la eksigon flanke de la edzino; siaflanke, la adulto, la senfrukteco, la neakordigebleco de temperamentoj rajtigas la disiĝon al la edzo. La adulto, tamen, nur malofte okazigas la disiĝon, ĝi estas krimo facile solvebla per pago de la koncerna monpuno. Oni povas ofte konstati familiojn, kiuj profitas la adultajn interrilatojn de la edzino, kiel unu el la plej gravaj familienspezoj.

La rajtoj de la gepatroj koncerne al la gefiloj treege diferencas inter la diversaj indiĝenaj rasoj. Inter la *Ba-Sele, Amboim* kaj *Ba-Pinda* la gefiloj kunsekvas la patrinon, ĉar, laŭ ili, "la bovidoj apartenas al bovinoj." Tiu kutimo, samkiel tiu de la edziĝopeto prezentita al la patrinaj onkloj, devenas ankoraŭ el la praa *patrinestreca reĝimo*. Ĉe la indiĝenoj el *Kibala* kaj *Libolu* la gefiloj kunsekvas la patron, kio jam reprezentas la reĝimon de la *patrestreco* kaj la submetiĝon de la virino al la viro. La posedaĵoj de la paro estas dividataj laŭ ilia deveno: al edzino apartenas tio, kion ŝi alportis en la hejmon, kaj la edzo konservas tion, kion li posedis. Se la eksedziĝo estas okazigita pro la edzino, la edzo rajtas postuli de ŝiaj gepatroj la valorsumon de la geedziĝaj donacaĵoj.

J. P. B.

Unuaj pioniroj de laborista Esp.-movado

Kronologia skizo ĝis la jaro 1921

Esperantismo — movado esence tutmonda kaj komune-homa neeviteble devis aliĝi al aliaj tutmondampleksaj movadoj, celantaj praktikajn akirojn en medio internacia.

La komenco de XX-a jarcento, evoluanta sub la signo de socia kaj ekonomia rekonstruo, sub la minaco de ĉiam kreskanta laborista movado, — pleje eluzis Esperanton tiudirekten.

Jam en novembro de la jaro 1903, kiam la nombro de esperantistoj estis tre malgranda en Stockholm fondiĝis unua laŭtempe "Esperanta Klubo de l' laboristoj".

La 1. januaro 1905 ĝin sekvis fondo de "Grupo Esperantista de laboristoj" en Frankfurt a. M. En la sama jaro en Parizo fondiĝis "Grupo Liberecana-Esperantista". Kelkaj agemaj samideanoj kaj kamaradoj decidis entrepreni vastampleksan internacian laboron. La ĉefan laboron gvidis tiutempe franca kamarado *F. Blangarin* (Fi-Blan-go).

Dum jaro 1906 ekaperis kelkaj broŝuretoj de la kolekto "Paco — Libereco". Ekfunkciis regule aperanta gazeto "Internacia Socia Revuo". En j. 1906 fondiĝis unua ekstereŭropa proletaria unuiĝo: "Esperanto Socialist Club" en Philadelphia. Ĉe la Komenco de la jaro 1908, krom la cititaj ekzistis ankoraŭ — Alĝeria laboristaro" kaj "Laborista grupo" en Rio de Janeiro.

La grupoj dume cititaj estis la unuaj lokaj Esperanto-laboristaj societoj. Tamen baldaŭ sekvis ilin kreo de naciaj kaj internaciaj unuiĝoj laboristaj esperantistaj.

Dum la II-a Universala, Kongreso Esperantista la 2. septembro 1906 okazis en Ĝenevo — unua internacia kunveno de "Ruĝuloj". Ĉeestis kamaradoj el Francio, Anglio, Britio, Germanio, Aŭstrio, Svisio, Polio kaj Manĝurio.

Ankoraŭ pli frue, dum aprilo 1906, Nacia Hispana Kongreso de Socialista Junularo, unua el la vico de kongresoj sekvontaj, aprobis kaj akceptis uzon de Esperanto. De tiu tempo komencante, la movado esperanta inter laboristaro ĉiam pligrandiĝis kaj kreskis. Kaj se la aŭtoritatuloj iafoje substrekadis sian ignoron por Esperanto (ekzemple dum la Kongreso Internacia Socialista dum 1907), despli intense Esperanto evoluis kaj progresis en la vastaj rondoj proletariaj, ekkomprenintaj la veran valoron de tiu internacia ligilo.

Je la komenco de la mondmilito, en la jaro 1914 ekzistis jam pluraj profesiaj internaciaj unuiĝoj esperantistaj (fervojistoj, maristoj, presistoj, poŝtistoj k. a.); ekzistis "Nederlanda Federacio de Laboristoj-Esperantistoj" (N.F.L.E.), "Bohema Laborista Asocio Esperantista", "Germana Laborista Esperanto-Asocio", Fédération Syndicale Espérantiste" kaj internacia "gruparo de socialistoj unuiĝintaj — *Liberiga Stelo*". Krome en diversaj landoj, eĉ en malproksima Ĉilia respubliko ekzistis lokaj laboristaj kaj revoluciemaj grupoj esperantistaj. Krom la "Internacia Socia Revuo" — aperadis revoluciemaj kaj laboristaj Esp-o-gazetoj en Francio, Bohemio, Germanio, Ĉinio kaj Japanio.

La ektondroj de la tutmonda militego grave malhelpis al libera kaj prospera evoluo de ruĝa esperantismo. Tamen la ekzistintaj grupoj kaj unuiĝoj daŭrigis sian laboron; kaj en Anglio ekzemple en jaro 1916 fondiĝis eĉ nova "Brita Esperanta Socialista Ligo.

Speciale en Rusio ĝis la revolucio de la jaro 1917 neniu Esperantista laborista organizaĵo ekzistis kaj povis ekzisti. Tamen kiel montras la dokumentoj de la cara ĝendarmaro, kiuj nun trafis en la manoj de CK SEU, — jam tiutempe Esperanto estis aktive uzata kaj praktikata en rusiaj rondoj revoluciaj.

Post la revolucio marta de 1917 en Petrogrado kaj Moskvo tuj fondiĝis lokaj grupoj de esperantistoj — socialistoj. La 1. majo 1917 ambaŭ grupoj partoprenis la manifestaciojn kaj unuafoje demonstris la unuigitan simbolon de verda stelo sur ruĝa standardo.

Tiujare estis publikigita ruslingve speciala "Manifesto de Unuiĝo de socialistoj-esperantistoj" (R. Civinski). Tamen inter la rondoj revolucianaj esperantistaj la ideo pri iu speciala "SE-ismo" ne havis subtenon.

Dum la unuaj monatoj post la marta revolucio preskaŭ ĉiutage naskiĝis novaj politikaj partioj. Unu el ili — "Tut-

monda Unuiĝo de Socialistoj" enkondukis en sian programon eĉ postulon pri tuja kaj senkondiĉa akcepto de Esperanto kiel lingvo internacia.

Je la fino de 1917 en Petrograd aperis 2 n-oj de socialista revueto "Torĉo".

Dum 1918 en Samara estis organizita oficejo de Esperantistoj-Socialistoj, en Saratov fondiĝis revolucia esperantista organizaĵo "Libera Torento" kaj Esperanta frakcio ĉe gubernia organizaĵo de RKP(b.).

Estis kelkaj provoj unuigi la fortojn de rusiaj revolucianaj esperantistoj. Je la komenco de 1919 en Moskvo estis kreita Tutruslanda Esperantista Komunista Federacio, fakte baldaŭ mortinta. En novembro de 1919 en Samara estis proklamita fondo de ESKI ("Esperanta Sekcio de Komunista Internacio", poste "Esperanta Komunista Internacio").

Tamen tiuj provoj ne multe sukcesis. Esperanto bezonis pli vastan kampon por agado kaj ne povis sin limigi per unu frakcio revoluciana.

Finfine dum majo 1921, dum III Tutruslanda Kongreso Esperantista en Petrograd, estis fondita *Sovetlanda Esperantista Unio*. Nova unio celis unuigi ĉiujn sovetlandajn esperantistojn, akceptantajn la idealojn de proletaria revolucio kaj soveta ŝtatsistemo.

Samjare dum la XIII. universala Kongreso Esperantista en Praha estis fondita *Sennacieca Asocio Tutmonda*.

Esperanto kiel ilo de revoluciaj rondoj eniris en novan fazon de sia evoluo. *E. Drezen.*

Alvoko

Ĉiuj kamaradoj esperantistoj-laboristoj, precipe SAT-anoj, kiuj partopenas ian-ajn delegacion veturantan Sovet Union, bonvolu antaŭ forveturo *nepre* sciigi Leningradan SAT-peranton — k-don S. Podkaminer, Leningrad, Petropavlovskaja, 4, kv. 34. — Tiam kamaradoj alveturantaj estos gasteme akceptataj kaj akompanataj.

Ĉiuj esp. laboristaj gazetoj estas petataj, nepre represi ĉi-tiun alvokon.

Leningrada SAT-grupo.

Grava peto al la virino

La ĉiumonata oficiala organo de virinfako en Laborista Partio "Laborista Virino" decidis enpresi Esp. leterojn. Necesas salutoj (eble por la Kristnaska festo) priskribo de la vivkondiĉoj, de kostoj de la vivrimedoj, de la kunvenoj kaj organizado inter la virinoj ktp., kaj ĉiuokaze de la virinvidpunkto. Ĉefe plaĉas al ni letero de orientulinoj. Helpu la vivplenan virinmovadon tie ĉi kaj ankaŭ pruvu la utilecon de Esp. al laboristvirino. Almenaŭ poŝtkarton sendu al: k-do *M. Starr, 25 New St., London S. W. I.* Ni sendos al ĉiuj ekz. en kiu ilia letero aperas.

Germanlingvanoj!

Flugfolioj por SAT kaj Esperanto estas ankoraŭ haveblaj ĉe: k-do H. Muravkin, Küstriner Strasse 8, IV., Berlin-Halensee.

KORESPONDEJO

3398. — Via manuskripto ne estas klara, bedaŭrinde ni ne povas uzi ĝin, estonte bonvolu skribi ĝin nur unupaĝe.

1897. — Korespondanoncojn ni enpresas nur post antaŭa pago.

F. kaj L. — Alvenis via manuskripto, sed kiu estas F. kaj L.?

3717. — Via raporto aperos mallongigite kaj sen la fotografaĵo.

4554. — Kvankam viaj artikoloj taŭgas pli en porpropagandaj gazetoj, ili tamen aperos en okazo de bezono. *Red.*

ELDONKOOPERATIVO

BIBLIOTEKO DE SENNACIULO.

Kamaradoj, certa tempo pasis de kiam ni publikigis en Sennaciulo la entreprenon pri eldono de "Biblioteko de Sennaciulo". Volonte ni estus daŭrigintaj nian planon skizitan, se la kamaradaro estus nin sufiĉe subtenintaj, almenaŭ tiel, ke ni havus 500 abonantojn al tiu Biblioteko, t.e. ke nia kondiĉo estus plenumita. Sed bedaŭrinde ĝis nun nur anoncis sin 80 abonantoj. Tamen, por ke nia plano ne rustu, ni klopodos daŭrigi la eldonadon de tiuj verketoj neperiode, laŭ financa forto. Ni intencas eldoni 3 seriojn: a: scienca, *b:* literatura, *c:* socipolitika. *Ĉiu serio enhavas 4 volumetojn, kompreneble, se la manuskripto de la aŭtoro ne superas la fiksitan prezon de la verketo, se ĝi tro superas la fiksitan prezon, ni estos devigataj eldoni duoblan volumon, ĉar la verkon ni ne povas dividi. Post sufiĉa pripensado ni nun ankaŭ povas sciigi la poekzempleran prezon de ĉiu verketo, same ankaŭ la prezon por la abonantoj. Ĉiu serio estas ankaŭ aparte abonebla. La abonprezo por unu serio estas 2,— mk. germ.; por ĉiuj 3 serioj 6,— mk., la prezo por unuopa ekzemplero estas 0.60 mk. Tiuj kamaradoj kiuj ĝis nun anoncis sin sed ne pagis, validas kiel abonantoj nur post pago de la koncerna abonsumo. La samo ankaŭ valoras por tiuj kamaradoj kiuj nur partpagis. Do kamaradoj, en viaj manoj nun kuŝas la prospero de nia plano kaj ni atendas vian intensan subtenon por efektivigi ĉi-planon.*

LA ELDONKOOPERATIVO.

Rapida riĉiĝo

Sinjoro Johano D. Rockefeller (Rokifelo) surprizas la mondon per siaj kolosaj donacoj. Sed li ankoraŭ estas malproksima de la mizerulejo. Mi ĵus faris malgrandan kalkulon, kaj mi trovas, ke laŭ la plej lastaj kalkuloj, li akiras duonan funton sterlingan posekunde aŭ 1800 funtojn pohore. Inter la 1-a kaj 4-a horoj matene, dormante, li akiras pli da mono ol estas la salajro de l' angla ĉefministro, aŭ tiom kiom 50 farmlaboristoj ricevas por si dum tuta jaro. *3398*

≡ KRONIKO ≡

Sovet-Unio

Tver. 20. okt. komencos funkcii kun la konsento de agitprop. fako de gub. kom-to RKP (b), *la ŝtataj Kursoj de Esperanto* ĉe Tvera fako de prof. klerigado.

Tio estas jam la dua ekzemplo de tute oficiala ŝtata instruado de esp. en Sovetio (unua ekzemplo en Kiev) kaj ĝi havas grandegan signifon, ĉar montras al altiĝanta intereso de Soveta registaro kaj kom. partio pri esp. administros kursojn k-do Varankin. Instruos: Sapekin, Filippova, Varankin kaj Genoviĉ: Kursoj ĉiuflanke estas egalrajtaj al aliaj profesiaj kaj teknikaj lernejoj, subiĝantaj al fako de prof. klerigado kursoj havos tri grupojn: elementan, superan kaj pedagogian.

Kursoj de esperanto ĉe Tvera urba komjunul-komitato estas finitaj. En mezo de oktobro komenciĝos kurso kun novaj aŭskultontoj, delegotaj de komjunul-ĉeloj.

Gubernia komitato de SEU organizis fakon de Int-nac. Koresp. por larĝa aplikado de ricevataj en Tver eksterl. let. ĉe raportoj en laboristaj kunvenoj pri klasbatalo en tuta mondo, por represigo de interesaj let. en sovetaj, partiaj kaj murgazetoj kaj por helpo al dezirantaj lab. organizaĵoj organizi int-nac. koresp. Eksterlandaj k-doj estas petataj sendi let. ĉu senpere al tiu fako, ĉu pere per ĝi al Tveraj profesiaj, partiaj kaj kom-junulaj organizaĵoj.

Komenciĝis kurso de esp. en Klubrondetoj de Kavaleria Lernejo kaj de unuiĝo de poŝt-telegrafaj laboristoj.

Gub. komitato de SEU nuntempe intertraktas kun administracio de kvar duagradaj lernejoj pri enkonduko de esp., laŭ la koncernaj rezolucioj de komjunulkunvenoj de ĉi-lernejoj. La Gubernia fako de popola klerigado principe ne kontraŭdiras. *SAT-ano 1116.*

Nederlando

Wormerveer. — Kamaradoj. — Ni denove abonis je Sennaciulo triafoje por 3 monatoj. — Ĉiuj anoj legas fervore sian gazeton. — Je 27. sept. ni akceptis viziton de juna SAT-ano el Estonio, kiu laboras kelke da tempo en nia Nederlando. — Ni pasigis kun tiu kamarado agrablan tagon. — Oni fotografis nin en la parko. — Preskaŭ ĉiuj anoj neniam renkontis kaj parolis kun fremdulo. — Esperanto estis nia nura lingvo — kaj perfekte ni ĉiuj interkomprenis. — Ni per skriba kurso varbas eble kelkajn novajn anojn por SAT. k-do *G. Woud.*

Amsterdam. 2. okt. 1925. Post la Unua Nederlando Espo-Kongreso en Hilversum, propono al nia klubo, ke ni estonte propagandu, (kaj agu laŭ) la SAT-principoj estis akceptita kaj ni ŝanĝis la statutojn, tiel ke nun ili estas konformaj al tiuj de SAT.

La intenco estas, ke ni formu la unuigon de SAT-anoj en Amsterdam, kaj estu la peranto inter SAT kaj ĝiaj A'damaj membroj, tiel aldonis al antaŭa nomo (Esp-ista Studa Klubo) la nomon SAT-grupo A'dam.

Pasintan lundon ni ree faris paŝon antaŭen, akceptante la proponon, ke *depost la 1. januaro 1926 ĉiuj el niaj membroj je kosto de la klubo povos fariĝi membro de SAT.* (Siatempe mi sendos la kotizon).

Al la diversaj ĉi-tieaj organizaĵoj laboristaj ni dissendis cirkuleron en kiu ni oferas nian helpon por eksterlandaj interrilatoj ktp. La 20. septembro ni partoprenis mitingon de CPH (Kom. Partio Holanda) kaj NLS (Nacia Labora Sekretariejo) kontraŭ ministro-prezidanto Colyn. Ni kunportis insignoforman, grandan "standardon" kiu tre altiris la atenton. Kaj proksiman dimanĉon ni partoprenos la demonstracion "Manojn for de Ĉinio!" Tiamaniere la afero de SAT en Amsterdam vigliĝas, malgraŭ la malhelpo de la ĉi tiea "neŭtrala" societo. En la jarlibro 1924 troviĝas nur unu Amsterdama SAT-ano, en 1926 estos almenaŭ *15!*

Gerard H. Bòsma, sekretario
SAT-grupo A'dam

LASTAJ NOVAĴOJ

El Kapstadt oni anoncas la finiĝon de marista striko.

En Paris polickomisaroj reviziis ĉe la kom. gazeto "Humanite" kaj konfiskis pluran flugfolian materialon diversan.

En Donawitz kaj Schönau la minejaj laboroj estas multe limigataj. Oni intencas okupi la laboristojn nur ankoraŭ dum du tagoj posemajne.

La Hamburga senato malakceptis la peton ke Adolf Hitler (konata gvidanto en la faŝista movado) paroli publike en Hamburg.

La striko de la britaj maristoj en Sudafriko kaj en ĉiuj britaj havenoj, escepte de London, finiĝis. Oni atendas, ke London kaj Aŭstralio sekvas la donitan ekzemplon.

En Greiz kaj ĉirkaŭaĵo la masonistoj eniris la strikon.

La denova komenco de la germanfrancaj ekonomitraktadoj estas prokrastitaj ĝis 20. oktobro, ĉar unu el la francaj traktantoj ne povas sufiĉe frue reveni el Budapest al Paris.

Informitaj medioj atribuas grandan politikan signifon al la nuntempe en London troviĝanta belga Financkomisiono.

La prezidanto de l' Tutrusia Kooperativa Unio, Khinchuk, alvenis Londonon. Li esploros la efikecon de l' rusaj komercorganizaĵoj kaj la eblecon por plua evoluo de l' eks- kaj importo.

La angla kabineto laŭtigis la deziron, doni pluajn rajtojn al la ŝtata sekretario por internaj aferoj, pli energie procedi kontraŭ la komunistoj.

En Madrid kvar studentoj, ĉe kiuj politika kaj porrevolucia propaganda-materialo estis trovita, estis arestitaj.

Pro salajrodiferencoj la organizaĵoj de la labordonantoj decidis la lokaŭton por la tuta kemia industrio en Bavaria depost 21. oktobro.

La Diktatoreco de la Ĵurnal-Posedanto

Pli potenca ol reĝo kaj parlamentanaro estas nun en Britio la milionuloj Rothermere, Beaverbrook kaj Berry. Ĉiutage la ĉefjurnalo de Rothermere vendiĝas je 1 700 000 ekz. Beaverbrook per sia ĵurnalo ŝanĝas politikon de la registaro. Berry nun posedas 10 ĉiutagajn ĵurnalojn, 5 ĉiudimanĉajn ĵurnalojn kaj 120 aliajn. Ĉefe intime li laboras kun la karbposedantaro. Kontraŭbatalante la Daily Herald ne atingis la disvendon de 500 000.

Je memoro de la 400jara datreveno de l' kampulbatalo apud Böblingen 1525

(Daŭrigo)

La eklezio akceptas egajn donacojn de la potenculoj el tereno rabita de kampuloj. La potenculoj tiamaniere subaĉetas la favoron de la ĉiopova papo. Sed tio ankoraŭ ne sufiĉas. Kampulo, kiam vi ne oferadas al eklezio, jam estas via animo en la purgatorio. Tiamaniere oni de kampulo ankoraŭ ruze forŝtelas, kio restis al li post la prirabado.

La multaj konfliktoj kaj militoj alportis ankoraŭ apartajn malfacilaĵojn. Dum monatoj devis servuti la kampulo kaj sin disponigi sur la batalejo. Se li volis esti liberigota de tiu servuto, tiam li nur povis fari tion, cedante sian tutan havaĵon al tiu aŭ tiu ĉi nobelo. Se nun la kampulo povis resti sur "sia posedaĵo", sekve nun ne plu kiel libera kampulo, sed nur kiel vasalo, liverante certan parton de la rikolto. Kun la perdo de la posedaĵo li ankaŭ perdis aliajn rajtojn, kiel la kunago ĉe juĝejo ktp. tiel ke lastfine la ĝisnuna vilaĝjuĝejo de ĉiuj kampuloj estis transformita en kortega juĝejo de la grafoj kaj kavaliroj. Tiamaniere la potenco kaj posedaĵo de la franka imperiestra oficistaro, disvolviĝis en la regiono ĉirkaŭ Böblingen, kiel aliloke. Dum tri tagoj po semajno la servutuloj devis servuti ĉu sur la bieno aŭ dum ĉaso. En kia kodo estas dio, ilia sinjoro, al ili doninta tian potencon, ke ni mizeruloj devu servute kulturi ilian posedaĵon, kaj nome nur dum bela vetero, sed dum pluvovetero pereu nia kun ŝvito perlaborita propra rikolto. Dio volu en sia justeco ne toleri ĉi kruelan papilian kaptejon, ke ni mizeruloj estu tiel forpelitaj. Plendas la kampulo je la fino de la XV. jarcento.

En la jaro 1493 estas per perfido malkaŝita sekreta kampulunuiĝo en Alzaco, kiu portas la nomen *Bundŝu,* laŭ la kradaĵa ligita piedvesto de la kampuloj. Ni estas la kampuloj, kiuj punas la nobelojn, estas ilia signalvoko. La unuiĝo estis perfidata de kampulo, kiu konfesis tion al la pastro, (1513) dum ilia genia organizanto Jost Fritz[1]) forigis la standardon kaj devis plurfoje rifuĝi. La fajrero de la ribelo daŭris ardeti sub la cindro, trovis sufiĉan nutraĵon, por, komencinte en fino de 1524 dum printempo 1925, flamihele ĉielon. En supra Ŝvabio[2]), en la Nigra arbaro, en Svisio, Tirolio, Alzaco ĉie ekribelas la kampuloj. La situacio estas favora. La Ŝvaba ligo troviĝas kun sia urĝa helpo en batalo kontraŭ Ulriko (duko). Al la duko Ulriko mankis la mono por salajri siajn dungitojn, ili iris hejmen. Nun la ribelaj kampuloj elrabis la abatejon Marĥtal en la Danubavalo. Kun 7800 pieduloj kaj 2000 rajdantoj la nobelo Georg de Waldenburg marŝas kontraŭ la ribelantaj kampuloj. Brave la kampuloj sin defendas, sed baldaŭ mankas la municio, nun la liguloj sub kavaliro G. povas ataki, 500 kampuloj mortfalas, 400 dronas en la Danubo, la aliaj rifuĝas, kun peno sukcesas la gvidanto Jakob Wehe ankoraŭ marŝigi 2000 virojn kontraŭ la liguloj. Post minaco de la kavaliro ili elliveras la bravan Jakob Wehe, kiu estas senkapigita. Lin anstataŭis Florian Geyer[1]), kiu perdis batalon ĉe Wurzach. Samtempe alia amaso da kampuloj estis antaŭ Weinsberg por "iri alporti paskajn ovojn". La famo de Wurzach ekfajrigis la kampulojn. Venĝo por la 7000 de Wurzach, venĝo por Jakob Wehe! eksonas la krio. Kiel katoj la "Nigra aro" de la kuraĝa Florian Geyer supren grimpis la kastelmurojn de Weinsberg. Sub la pik- kaj batmiloj falas la defendantaro. La flago de la "Nigra aro" flirtas post iom da tempo sur la kastelo. Pordegoj krakas kaj rompiĝas. Amase invadas la Hela aro de la unuigitaj kampultrupoj. Feŭdulkranioj estas fendataj. Tiranojn oni saltigas malsupren de la preĝeja turo. La gvidanto de la militistaro Helfenstein kun kelkaj aliaj estas kaptita kaj transdonita al Jäklejn Rohrbach, gastmastro en Böckingen, por gardi ilin. Sed Jäklejn havas malmulte da disciplino, nur egan malamon kontraŭ la oligarkio.

(Daŭrigota) Kompilis: *H. N. (511).*

[1]) Reorganizinto de la "Bundŝu" 1502, iama soldato kaj ĉiurilate distinga karaktero.

[2]) Parto de la hodiaŭa Virtembergo kaj Bavario ĝis konstanca lago.

[1]) Franka Kavaliro, vidu Prol. Kantaro paĝo 82 murdita de sia bofrato pro Klasperfido

KORESPONDADO

TARIFO

Korespondado: Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon.

Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* PI = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarko sur bildflanko.* k.ĉ.l. = *kun ĉiuj landoj.* esp.aĵo = *esperantaĵo.*

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas **la devon, nepre** respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Germanio.

— K-do *Kurt Putz* (kompostisto), Augustastr. 23, *Straŭsberg i. d. Mark,* pri anarkismo, sindikalismo, esp.- sport-k. junularmovadoj, L, PK, PI, bfl., k. ĉ. l.

— K-do *W. Hoyer,* Fabrikstr. 28, *Altenburg i. Th.* dez. koresp, k. interŝ. PM.

— K-do *Georg Richter,* Kuglerstr. 151, *Berlin,* dez. koresp. k. ĉ. l. PK, PI.

— K-do *Walter Wolf,* ferv. asistanto, *Leipzig,* Güterabfertigung Bayerischer Bahnhof, dez. koresp. k. interŝ. L, PK, PI, bfl, PM, certe resp.

Litovio.

— K-do *Ŝ. Trejvas,* Vaiku Namai, Pilies 13, *Kaunas,* dez. koresp. esp., ruse k. jude.

Sovet-Unio.

— K-do *D. Albanov,* Krapivnaja, 21, *Saratov,* pri sociologio, organizo kaj praktikado de kooperacio.

— K-do *E. Tuljakova,* prospekt Karla Libkneĥta 63, kv. 15, *Leningrad,* dez. koresp. kun liberpensuloj el ĉ. l.

— K-do *Albanov, Arkadak* (Saratov. gub.) pri sociologio kaj vivkondiĉoj en div. landoj precipe kun ekstereŭropaj, L, PI.

— K-do *Pavilionov,* Otrjad Jun. Pionerov, Gosud. Elektrost. *Elektroperedaĉa,* Bogorodsk. u., Mosk. gub., k. ĉ. l.

— Ĉefa inĝeniero de Radio-fako MGSPS. (Moskva Gub. Sindikataro) k-do *A. Vinogradov* korespondas kun radiistoj-specialistoj de tuta mondo. Interŝanĝe sendas rusan gazeton "Radio-Amatoro". Akurate respondas. Adresu: Al inĝ. *A. V. Vinogradov,* Radio-stacio MGSPS, Bol. Dmitrovka 1, *Moskvo.*

Redakcio de ĉiumonata studenta ĵurnalo

„Ruĝa Standardo"

Чырвоны Сьцяг

petas ĉiulandajn studentojn partopreni en ĝi sendante artikolojn kaj artikoletojn pri demandoj de supera lernejo kaj pri vivo de studentaro. Ankaŭ tradukoj el gazetoj pri studentaro de Sovet-Unio kaj Blankrusio.

Adreso: **Sovet-Unio,** Blankrusio **Minsk, Poŝtkesto 33.**
Al redakcio de studenta ĵurnalo "Cyrvony Stjag".

Alvoko!

Al ĉiulanda gekamaradaro.

Kamaradoj! Kiuj el vi estus bonintence helpemaj al mi en la kolektado kaj kunmetado de l' studmaterialo pri la ekonomibatalo de l' proletaro?

Bonvolu respondi la jenan enketon laŭ la demandoj. Mi petas nur fideblajn kaj realajn respondojn tute objektivajn, nur ekonomicele okazintajn kaŭzojn de l' strikoj.

1. Kiom da ekonomistrikoj okazis de 1904 ĝis 1914?

2. Kiom da strikoj el ili sukcesis, kiom estis venkitaj?

3. Kiom da salajro-altigo estis atingata per la strikoj dum daŭro de ĉi 10 jaroj? (en procentoj).

4. Kiom da plikariĝo de l' vivbezonaĵoj okazis dum ĉi 10 jaroj? (ĝenerale en procentoj).

5. Antaŭ aŭ post kiuj sukces-strikoj okazis rimarkinda plikariĝo de l' vivbezonaĵoj? (mencii la jarojn de l' strikoj).

6. Antaŭ aŭ post kiuj venkitaj strikoj okazis rimarkinda plikariĝo de l' vivbezonaĵoj? (mencii la jarojn de l' strikoj).

7. Kiom foje la proletaro sukcesis sen striko, okaze de malvalidiĝo de l' kolektiva porsalajra kontrakto pli altigi la salajronivelon de l' antaŭpasinta jaro? Kiom foje ĝi malsukcesis certigi la salajro-nivelon de l' antaŭpasinta jaro, sed nur sub ties nivelo (informo nur pri unu ĉefindustria branĉo kaj en procentoj mencii ambaŭokaze la jarojn).

8. Ĉu okazis memvola pli altigo de salajro flanke de l' kapitalistoj nur post konstato kaj deziresprimo de l' Proletaro? (mencii industrion, jaron kaj procenton).

9. Mallonga karakteriza skizo pri la plej sukcesa striko (rimarkindaj ekonomikaŭzoj de l' eksplodo kaj venko tempdaŭro de l' striko, postulo en procentoj, jaro ktp.

10. Mallonga karakteriza skizo pri la plej kruele venkita striko (same kiel demando 9-a).

Samajn respondojn mi petas por la jardeko 1915—1924. La respondoj povas koncerni aŭ ĝenerale la tiulandan ekonomimovadon, aŭ nur unu el la ĉefindustriaj branĉoj sed ambaŭkaze mencii ĝian kvaliton.

Mi tre volonte ŝanĝus opinion kaj deziras ekkoni diversajn direktivprincipojn pri ĉi temo kaj deziras korespondadi kun seriozaj kompetentaj k-doj.

Adreso: *Stefano Michalicska,* Elektroperedaĉa Bogorodsk. Mosk. gub. USSR.

Peto

Du junaj militliberaj elektristoj spertaj en ĉiuspecaj laboroj serĉas laboron. Kamaradoj kiuj donos al ni bonan informon, ni bone rekompencos. Skribu al: k-do *Stefano Matejovsky,* Sabinovska 33, *Preŝov* (Ĉekoslovakio).

"Amuza Anguleto"

Solvo el la N-ro 1

(Len-o—Len-in'.)
(Lenin kaj Internacio.)

— Pri konata tragediartistino Sarah, kiu estis prototipo[1] de plej ebla malgraseco, ŝercis unu Pariza gazeto:

Noktmezo sur la bulvardo. Al la angulo de Grand Hotel alveturas malplena kaleŝo. Kiu eliras? Sarah Bernhardt!

Elgermanigis *S. Kreĉetnikof.*

* * *

— Unu ruso venis al medicina regna ekzameno. Rudolf Virĥov metis ian preparaton antaŭ la kandidaton: "Kio estas ĉi tio?"

"Tio estas *das Lebber.*"

Virĥov: "Unue tio nomiĝas ne *das* Lebber, sed *die* Lebber; due tio nomiĝas ne die *Lebber,* sed die Leber (hepato; elparolu: lej ber) kaj trie tio estas ne die Leber, sed die Lunge (pulmo). Mi dankas vin, sinjoro kandidato.

Elgermanigis *S. Kreĉetnikof.*

[1]) Modelo.

RECENZEJO

Gazetoj

Represis el S-ulo: *Le Libéré,* (Nice), 31. 7., Mortigoj de ĉinoj (S. 34); 15. 8., Samark. esploroj (S. 36); 30. 8., Ili festas (S. 41). *Le Réveil Alsacien,* (Strasbourg), 19. 9., Ili festas (S. 41). *Toveritar,* Astoria (finnausona), 8. 9, Virino en Sov. (S. 33). *"Bezboĵnik"* (Moskvo), 23. 8., Religiaj parazitoj en Polio (S. 39). *"Komunist"* (Astraĥan), n-o 130, La ordono de diplomataro . . ." (S. 34). *"Tverskaja Pravda"* (Tverj), n-o 142, Kelkaj strikbildoj el Ĉekoslovakio (S. 35); La grenpolitiko en Rumanio (S. 35); n-o 143, Letero el Sofio (S. 37); n-o 145, Letero el Italio (S. 35); Iom pri nuna stato en Finlando (S. 37).

Pri V. Kongreso de SAT: *Le Droit du Peuple,* (Lausanne), 9. 9.; *"Izvestija"* (Moskvo), 3. 9.; *"Pravda"* (Moskvo), 13. 8.; *"Komunist"* (Ĥarkov), 5. 9.; *"Sovetskaja Sibirj"* (Novo-Nikolaevsk), 9. 9.; *"Krasni Nikolaev"* (Nikolaev), 19. 8; *"Tverskaja Pravda"* (Tver), 18. 8.; *"Trud"* (Klinci), 19. 8.; *"Sovetskaja Stepj"* (Orenburg), 19. 8.; *"Uralskij Raboĉij"* (Sverdlovsk), 20. 8.; *"Krasnoarmejskaja Pravda"* (Smolensk), 15. 8.

Mencioj k. div. notoj: *Daily Herald,* London, 3. septembro, pri S-ulo, 29. septembro, pri sovetl. esp. poŝtkarto, *Jung-Spartakus,* Berlin, okt., cifera enigmo (kun vorto Esperanto).

Nekrologo

La 29. septembro mortis nia aktiva membro k-do

Ogloblin Aleksio

en **Popovka** (Sovet-Unio) (SAT-ano 5121).

Honoron al lia memoro!

PRESEJO: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG (GERMANIO)